Esperanto servu pacon!

# A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

№7(11) Julio-aŭgusto 1974

## KONCIZA PROTOKOLO
## DE LA VIII KONFERENCO DE SEJM-KONSILANTARO

La unua tago, 16.7.74

A.Gonĉarov en la nomo de SEJM-Komitato malfermis la Konferencon kaj faris enkondukan parolon, en la fino de kiu li prezentis la gvidanton de la Konferenco V.Aroloviĉ.

Temo: RAPORTOJ DE LA LOKAJ KLUBOJ

BARNAUL(V.Ebel). La klubo nombras 38 homojn, el ili aktivas 19. La Konferencon partoprenas 10 klubanoj, la tendaron-13. En Barnaul ekzistas du disaj kluboj: la ĉefa kaj tiu de progresantoj. La kluboj havas diversajn programojn kaj kunvenas en malsamaj tagoj. La plej gravaj dumjaraj atingoj estas: regula eldono de la SEJM-bulteno "Aktuale", eldono de kolora E-afiŝo, aktiva partopreno en E-renkontiĝoj, organizo de E-kurso ĉe la regiona biblioteko, kiun sukcese finis 7 homoj. Dum la jaro regule funkciis tradukista sekcio. La ĉefa malfacilaĵo estas malaktiviĝo de klubanoj. Ni planas en estonto revivigi la bonajn tradiciojn. ?

ĈELABINSK(V.Andreev). En la klubo estas 15 membroj, el kiuj la Konferencon partoprenas 2 homoj, la tendaron - 5. La klubo aranĝis REVU-8, organizis vesperon de E-poezio en la publika biblioteko kaj unu radioelsendon en la urba radio. En la instituto de kulturo okazis prelego pri Esperanto kun akompana koncerto. La ĉefa malfacilaĵo - foresto de anstataŭantoj. en la estonto estas planata E-rondeto.

ĤARKOV(A.Lukin). Dum la pasinta periodo funkciis 3 E-kursoj, el ili unu estis eksperimenta. La kursojn finis 30-35 homoj. En la urbo gaste estis esperantistoj el eksterlando: 2 el Rumanio, 1 el Ĉeĥoslovakio, 1 el Italio. La renkontiĝo kun la italo estis oficiala. Estas elaĉetitaj ĉ. 200 E-rusaj vortaroj. Manko en la laboro - multaj membroj malaktiviĝis. Nune en la klubo membras 27 homoj, el ili aktivas 7; la Konferencon partoprenas 2 homoj, la tendaron - 6.

ĤMELNICKIJ(A.Rogov). En la klubo estas 30 membroj, ĉirkaŭ duono - junularo. Ĉiujare okazas E-kurso, kiun komencas ĉ. 30-35 homoj kaj finas 10-15. Klubaj kunvenoj okazas laŭ plano, estas diversaj lingvaj ekskursoj, korespondado k.t.p. Multan helpon ni faras al Ljvov. Nia klubo korespondas kun 200 aktivuloj de Sovetunio. La kluba biblioteko enhavas ĉ. 30-40 libroj, kiuj estas konstante uzataj. Ni abonas preskaŭ ĉiujn aboneblajn esperantaĵojn. En la loka preso 2-3 foje en monato aperas priesperantaj materialoj.

KAUNAS(E.Eselinas). En la klubo estas 59 membroj, aktivas 20,

la Konferencon partoprenas 1, la tendaron - 3. Ni elaĉetis E-rusan vortaron kaj "Nuda inter lupoj". Estis organizitaj kaj partoprenitaj E-renkontiĝoj. La ĉefa malfacilaĵo - malbonaj interrilatoj kun oficialaj instancoj. En estonto ni esperas ricevi konstantan ĉambron. Estas planate traduki litovajn popolajn fabelojn.

KIEVO(M.Lineckij). En Kievo ĉio nun stagnas. Estis du kursoj, kiujn finis 17 homoj, el ili restis 8. El spertuloj kaj aĝuloj aktivas neniu. La kunvenoj okazas dufoje en semajno. Por septembro-oktobro ni planas oficialiĝi kiel Klubo de internacia amikeco. Nia biblioteko enhavas ĉ. 200 librojn. Estas aĉetitaj 100 ekzempleroj de la vortaro. Dume mi faras mem la tutan laboron, sed preparas helpantojn.

KLAIPEDA(D.Lukauskaite). En la klubo estas 120 membroj, aktivas 40. La klubo estas komuna. El la klubanoj la Konferencon partoprenas 6, la tendaron - 9. Dum la jaro estis aranĝita ekspozicio de internaciaj infandesegnaĵoj, okazis 3 tuturbaj kunvenoj, 3 koncertoj por neesperantistoj kun 3000 da vizitintoj, funkciis nacilingva E-fakultato ĉe Popola universitato. Oni korespondas kun 38 landoj. La biblioteko nombras 351 librotitolojn. 120 esperantistoj partoprenis la tradician tendaron "GIRULIAI-74". La klubo kunvenas vintre dufoje en semajno, somere - unufoje. Ĉefaj malfacilaĵoj: manko de profesiaj instruistoj kaj malpermeso instrui E-on fakultative en lernejoj. La planoj por estonto: aktivigi novajn membrojn, multobligi E-lernilojn.

KOLOMNA(L.Borisov). En la klubo estas 11 membroj, aktivas 3. Dum la jaro laboro fakte ne estis kaŭze de malbonaj rilatoj flanke de oficialaj instancoj kaj pro pasiviĝo de la estinta prezidanto E.Zajdman. En perspektivo dume nenio estas vidata.

LENINGRAD(A.Ŝalygin). La Konferencon partoprenas 1 homo, la tendaron - 3. Prezidanto de la klubo estas V.Ĥitún. La kunvenoj okazas laŭprograme, unufoje en semajno. La klubo havas propran ĉambron. La estraro de la kulturdomo bone rilatas al e-istoj. Niaj klubanoj aktive partoprenis E-aranĝojn en Vilnius kaj Ignalina. Estis 2 kursoj, kiujn finis 10 homoj. Nin vizitis gastoj el Pollando, Italio, Danlando k.t.p. V.Cvetkova faras bibliografion de E-literaturo. Estis faritaj 6 murgazetoj kaj 2 ekspozicioj. La klubo fakte jam ne estas komuna, junularo kaj maljunuloj kunvenas en diversaj haloj.

MAĤAĈKALA(A.Junusov). En la klubo estas 20 personoj, aktivas 16. Estis 2 kursoj: unu kurson finis 4 homoj, la alian en la pedagogia universitato - preskaŭ ĉiuj komencintoj (ĉ.50 homoj). La universitataj oficialuloj favore rilatas al E. Estis kelkaj prelegoj, post kiuj elpaŝis agitbrigado kun koncertoj, okazis 2 televidaj elsendoj, en la fremdlingva fakultato de la universitato okazis disputo pri E. En estonto ni planas fondi E-katedron ĉe la fakultato pri sociaj profesioj de la universitato. Ĝenerale la kluba laboro estis malpli vigla ol en la pasintaj jaroj. La filmo pri SEJT-15 estas preta, sed oni malpermesis ĝin montri. Nune estas starigataj kontaktoj kun proksimaj E-kluboj, sed pro neforteco de tieaj esperantistoj ni ne povas organizi renkontiĝojn. Estas preparata E-lernolibro kaj planata scienca laboro.

MOSKVO(V.Aroloviĉ). La klubo estas komuna, ĝi enhavas 15 membrojn. La Konferencon partoprenas 3, la tendaron - 10 homoj. La plej granda evento - renkontiĝo kun partoprenantoj de Internacia kongreso de pacamaj fortoj. Estis kelkaj artikoloj de k-do Ĥarkovskij pri E, okazis kelkaj elurbiĝoj. Ni sendis gratulon al la XVII kongreso de VLKSM. Propagandcele A.Ĥarkovskij prelegis pri E. en komunloĝejo de la pedagogia instituto. Ĉiujare okazas kursoj. La ĉefa malfacilaĵo - sperteco de la klubanaro. ?

OMSK(A.Kogan). En la klubo estas 27 membroj, aktivas 15. Dum la jaro okazis radioelsendo, televidoelsendo, vespero, dediĉita al A.Puŝkin, vespero de Baghy-poezio, renkontiĝo kun propagandisto, ekspozicio de infandesegnaĵoj. Estas abunda korespondado kun multaj landoj. Precipe korespondas aĝuloj. Estas akiritaj la E-rusa vortaro kaj la libro "Nuda inter lupoj".

POLTAVA(V.Noĉovkin). Ni havas du klubojn. La unua nobras 20 homojn, aktivas 10; la dua enhavas 15, aktivas ĉ. duono. La dua klubo estas kreita pasintjare. Aperis kelkaj artikoloj pri E. en la loka preso, okazis kelkaj prelegoj, funkciis E-stando. Oni monsubtenas nin. 6 klubanoj ricevis oficialajn atestojn kun rajto instrui.

STERLITOMAK(Z.Hafizova). En la klubo estas 17membroj, 10aktivas. Estis 3 kursoj, kiujn finis 30 personoj. Funkciis konstanta E-stando. Printempe 20 personoj partoprenis en interklubaj E-aranĝoj. Ni havas 31 ligojn kun 7 ŝtatoj. La kunvenoj okazas unufoje en semajno laŭ antaŭe planita tagordo. Estis kelkaj prelegoj pri E. La oficialaj instancoj bone rilatas al ni kaj promesas helpon. La tendaron partoprenas 6 personoj.

TAŜKENT(E.Perevertajlo). Estis nur du kursoj: elementa kaj progresiga. La kursojn finis ĉ. 8 personoj. Estis kelkaj artikoloj en lokaj gazetoj. Ni akiris 200-voluman E-bibliotekon de mortinta E-veterano. Alia laboro ne estis. Preskaŭ ne okazis kunvenoj. La klubo estas sub la minaco de disfalo.

TULA(informas M.Bronŝtejn). En la klubo estas ĉ. 20 personoj. Ĉi-jare estis bonaj kondiĉoj por la laboro: estis ricevita permeso publikigi kelkajn artikolojn, estis organizita kurso en la Palaco de profunuiĝoj, estis libere vendata la vortaro de E.Bokarev. La Centro-Rusian regionan renkontiĝon malhelpis organizi la malbona vetero. Al la tendaro venos ĉ. 7 personoj.

UFA(N.Cvileneva). En la klubo estas ĉ. 40 membroj, aktivas iom pli ol duono. En la pasinta periodo estas publikigita E-lecionaro en "Leninec", rezulte de tio ekzamenon plenumis ĉ. 80 personoj. Estas presitaj oficialaj atestiloj por la klubanoj. En la klubo aktivas pasintjaraj progresantoj. Estis 6 rondetoj, okazis unu radioelsendo, kelkaj prelegoj. Ufanoj aktive partoprenis E-renkontiĝojn. En Ŝalavat estas kelkaj personoj studintaj E-on koresponde, kaj poste ilia grupo iĝis kvazaŭa filio de la Ufa E-klubo. La ĉefa malfacilaĵo - manko de konstanta ejo. La Konferencon partoprenas 7 personoj, la tendaron -15.

La dua tago, 17.7.74

IVANOVO(S.Smetanina). Nia klubo havas 30 membrojn. Dum la pasinta periodo okazis 30 prelegoj por neesperantistoj, 30 personoj finis elementan kurson, 25 - la progresantan. Ni faris kelkajn turismajn marŝojn. Estas aĉetitaj 40 vortaroj de E.Bokarev, 20 ekzempleroj da "Nuda inter lupoj". Oni promesis doni al ni konstantan rubrikon en nia junulara ĵurnalo. La ĉefa malfacilaĵo: multaj studentoj fininte instituton forveturas.

USTJ6KAMENOGORSK(B.Anoĥin). La klubon membras 15 homoj, aktivas 8. La kunvenoj okazas ĉiuĵaŭde. La klubo kaj 8 klubanoj ricevis honorfoliojn de la obkomo de komsomolo. Okazis 3 televidaj elsendoj: elpaŝo pri kursoj, filmo pri kluba vivo, informo pri la OSER-21, kiun aranĝis nia klubo kaj kiun partoprenis 40 personoj el 5 siberiaj urboj. Estis 1 E-kurso, ĝin finis 13 homoj. Ni havas 40personojn kaj 2 klubajn korespondligojn. Nia klubo esperas je

ricevo de propra ĉambro. Pasintperiode ni festis 9-jarecon de mia klubo. En la 1975 jaro okaze de la 10-jara jubileo ni planas organizi SEJT-17.

VELIKIE LUKI(G.Ĵalnina). En la klubo estas 6 membroj, ĉiuj aktivas. Ni kolektive abonis 12 revuojn. La biblioteko enhavas 20 librotitolojn. En la loka gazetaro aperis 4 E-artikoloj.

VILNIUS(P.Egorovas). El 38 membroj aktivas 13; la Konferencon partoprenas 5 personoj, la tendaron -7. En la pasinta jaro nia klubo plene oficialiĝis. Estis 4 E-kursoj, estas fondita kaj aligita al SEJM nova E-grupo en la urbo Kapsukas. Ĉe ni gastis multaj eksterlandanoj, el niaj klubanoj nur unu estis eksterlande dum la pasinta jaro. Pri malfacilaĵoj: al ni malbone rilatas oficialaj instancoj, abundas novaj homoj kun nealta lingvoscio, ne bone statas la financaj aferoj. En estonto estas planataj pli ol 4 kursoj. La interrilatoj kun aĝuloj pliboniĝas - okazis kelkaj komunaj kunvenoj.

ZAPOROĴJE(V.Ladygin). En la klubo estas 20 klubanoj, prezidias D.Kolker. La kunvenoj okazasunufoje en monato. Dum la jaro estis kelkaj prelegoj en lernejoj. La kluba laboro pliviglìĝas, sed ni ne havas konstantan kunvenlokon. La lokaj gvidantoj rilatas al ni malfavore. Eble ni sukcesos organizi renkontiĝojn kun eksterlandanoj pere de "Sputnik".

RAPORTOJ DE SEJM-KANDIDATOJ

MIASS(L.Novikova). En la klubo estas 20 membroj, ĉiuj aktivas; la Konferencon partoprenas 1 homo, la tendaron - 6. Estis 3 kursoj, kiujn finis 35 homoj, okazis 13 prelegoj pri E., ekspozicio de infandesegnaĵoj kun ĉ. 6 000 vizitintoj. La klubo ricevis ejon. Ni aktive organizis kaj partoprenis E-renkontiĝojn. En la loka preso estis 6 artikoloj pri E. La biblioteko nombras 40 librotitolojn. Perspektivoj- organizi 6 E-kursojn: progresantan, metodikan kaj 4 elementajn. Ni petas la Komitaton akcepti nin en SEJM.

KAPSUKAS(informas V.Ŝilas). En la klubo estas 8 membroj. La klubo partoprenas ĉiujn renkontiĝojn en Litovio. En la biblioteko estas 15 libroj.

SALAVAT(informas B.Kolker). La klubo enhavas 12 homojn, gvidas V.Zibenkes. Estis unu E-kurso, kiun finis 8 personoj. La klubanoj aktive partoprenas E-renkontiĝojn. Perspektivoj estas bonaj.

TALGAR(G.Gercikov). Estis publikigitaj 3 lecionoj de E-kurso en la ĵurnalo "Zvezda Alatau". En Alma-Ata devas aperi E-insignoj. Nune la klubo havas 14 membrojn, 11kursanoj bone plenumis E-ekzamenon. Aktivas 6 homoj, 2 partoprenas la Konferencon.

TIĤVIN(M.Bronŝtejn). Ni havis 2 kursojn, kiujn finis 8 personoj. Estis organizita ekspozicio pri SEJT, en la urba radio estis unu elsendo. Ni multe vojaĝis kaj mem akceptis gastojn.

RAPORTOJ DE NEALIĜINTAJ GRUPOJ

MEĴDUREĈENSK(informas A.Gonĉarov). Ĉi-jaran kurson finis 8 homoj. La Konferencon partoprenas 1 homo, la tendaron - 3. La perspektivoj estas bonaj.

KUJBIŜEV(informas B.Kolker). La grupon eniras 11 homoj, inter ili 4 gejunuloj; okazis 4 ekspozicioj; aktivas 4 homoj.

VILENDI(informas V.Ŝilas). En la klubo estas 18 membroj, aktivaj - 10; La klubo havas ĉ. 200 ligoj kun 22 landoj. Estas peto flanke de la klubo lasi ĝin kandidate.

VITEBSK(N.Kokoŝina). Okazis 4 prelegoj. 8 personoj finis elementan kurson. La Konferencon kaj tendaron partoprenas 1 homo. En la sekva jaro ni planas 1 rondeton. La grupo por kandidatiĝo ankoraŭ ne maturiĝis.

KONKLUDA VORTO (A.Gonĉarov).
En la pasinta periodo SEJM sufiĉe multe laboris. Centra gazetaro sufiĉe ofte informis pri E-to. SEJM bone kreskas: ĝi havas 30 aliĝintajn klubojn, 7 kandidatojn kaj 21 subtenantojn.

Temo: INTERNA KLUBA VIVO

ENKONDUKA VORTO (A.Gonĉarov).
Interesa kluba vivo signifas aktivecon de klubo. Ni devas kolekti pozitivan sperton de ĉiuj kluboj por imagi al ni modelan kluban vivon.

V.Ŝilas(Vilnius). Kluba laboro estos sukcesa, se ĝi estas antaŭplanita. Interesa aranĝo ankaŭ estas interna kluba vivo.
A.Rogov(Ĥmelnickij). Ni legas ĉiujn interesaĵojn el la abonitaj revuoj, organizas enurbajn kaj eksterurbajn ekskursojn, vesperojn de leteroj, interŝanĝas parolantajn leterojn. Unu homo ĉiam respondecas pri studado de novaj kantoj.
A.Gonĉarov(Barnaul). Estas du specoj da kluboj - "freŝa" klubo, organizita tuj post la fino de elementa kurso, ĝi okupiĝas pri amuzaj aferoj (ekskursoj, ludoj, korespondado...), kaj klubo de bonaj parolantoj, kiu okupiĝas pri serioza laboro. Ni devas pripensi la laboron de tiuspecaj kluboj , kiel fari ilian vivon interesa. Antaŭe tiu problemo ne estis, ĉar ni ĉiuj estis progresantoj kaj perfektiĝis en la lingvo. Estas propono doni la vorton al Ufa, kiu pasintjare okupis la unuan lokon.
N.Cvileneva(Ufa). Ni faris seminarion pri la historio de la E-movado. Klubanoj laŭvice elpaŝis pri iu temo, sed ne ĉiui bone rilatis al tiuj taskoj. La kluba vivo estas pli vigla dum la posttendara periodo ĝis la Nova jaro. Ne ĉiuj plenumintoj E-ekzamenon restas. Necesas informi tiel komencantojn kiel progresantojn pri la Movado. Necesas fondi duan klubon por progresantoj.
G.Gercikov(Talgar). Nia fina celo - oficialiĝo. Ĉiu klubo devas fari konkretan laboron por atingi ĉi-celon. Klubon dividi ne necesas. Nia tasko estas instrui la lingvon kaj disvastigi E-ideojn.
M.Bronŝtejn(Tiĥvin). Ĉiu fininto E-kurson havu ian konstantan taskon aŭ okupiĝu pri tradukado(t. e. trovu sin en la klubo), alie oni foriros. En nia socio ne tiom gravas la E-edukado mem, kiom praktika utiligo de E.
A.Rogov(Ĥmelnickij). Per korespondado kun samfakuloj oni povas okupigi jam boneparolantojn.
A. Gonĉarov. Mi gvidas kursojn de la 1963j. Ĝis la 1969 j. la kursfinintoj aŭtomate aliĝis al la klubo. Granda distanco en scio de la lingvokaŭzis abundan foriron de progresantoj. Nun staras problemo de du kluboj. La dua klubo devas paroligi novajn esperantistojn, krei kolektivon. Por tio utilas kantado, komuna promenado, ekskursoj, "brasikvesperoj"... Kaj nenur la gvidanto devas ĉion organizi. La klubo devas havi propran taskon. La unua klubo organizas la ĉefan E-laboron. Necesas krei "kulton" de tendaro: rakonti pri la tendaro, kanti tendarajn kantojn k.t.p.
V.Ŝilas. Devas esti bonaj tradicioj de kluba vivo. Necesas alklubigi negrandgrupe kaj solene. Devas esti antaŭkluba laborperiodo; Ĉiuj taskoj estu distribuitaj.

A.Vizgirdas(Klajpeda). Nia klubo havas konsilantaron, propran statuton k.t.p. Dum kunvenoj ni informas pri novaĵoj, funkcias E-biblioteko. Ni klube partoprenas en konkursoj de Pola radio, vaste korespondas. La"progresanto"-problemo ekzistas ankaŭ por ni. Dum la kunveno estas kelkaj elpaŝoj laŭ la listo. Ni regule faras ĝeneralajn kunvenojn.

A.Gonĉarov. Necesas eduki kursanojn. Mi en ĉiu leciono ĉ. 5 minutojn dediĉas al informoj pri la Movado. Scio de tiaj faktoj igas homon babili pri E kaj por E; Kiel fonto de informoj oni povas uzi la libron de E.Svadost kaj alian literaturon.

S.Gaidamavičius(Vilnius). Nia klubo estas dividita je 4 fakoj: propaganda, renkontiĝa, eksterlanda, lingvo-literatura. La kunvenojn gvidas laŭvice ĉiu fakestro. Kunveno havas unu ĉeftemon( laŭ la kalendaro, pri aktualaj demandoj k.t.p.). La fakoj organizas konkursojn, viktorinojn.

P.Egorovas(Vilnius). Divido de la klubo je fakoj estas formo por laborigi homojn. La fakoj renkontiĝas ankoraŭ en kromkunvenaj tagoj, kaj por ĉiu homo sufiĉas da taskoj.

A.Ŝalygin(Leningrado). Ĉe ni ĉiu homo rakontu la enhavon de tralegita libro. Ni sendas progresantojn al eksterlandanoj, kaj ili vole-nevole devas paroli nur Esperante.

A.Kogan(Omsk). La klubo devas interesiĝi ne nur pri la agado de membro en la klubo, sed ankaŭ pri lia laboreja, lerneja k.t.p. vivo.

G.Gercikov. Nia klubo estas korespondo-klubo: ĉiu semajne ni forsendas kaj ricevas ĉ. 10 leterojn. Kutima kunveno: tralego de leteroj, pridisputo de la enhavo, de la lingvonivelo, komuna respondoskribo. Ni subtenas kontakton kun foraj klubanoj.

V.Laptev(Ĉelabinsk). Postenoj en la klubo estas nur simbole. Estas homoj, kiuj uzas E-ton nur por si mem, aliaj prenas taskon, sed ne plenumas ĝin, la triaj malbone parolas, sed serioze rilatas al la taskoj. La kunvenoj pasas enue - en atendado kaj babilado.

A.Gonĉarov. En estonto estos propagandistoj de E. Donu al la klubanoj prelegon aŭ materialon por ĝi. Tiel vi preparos prelegontojn kaj okupos la klubanojn per laboro.

A.Junusov(Maĥaĉkala). En la klubo estas same 2 tavoloj: spertuloj kaj "krokodiloj". La laboro iom vigliĝas, kiam estas preparo al iu entrepreno: konstrutaĉmento, renkontiĝo..., sed estas periodoj, kiam ni ne scias pri kio okupiĝi. Multaj deziras gvidi kurson, pro tio ni organizis"kurson por gvidanto". Por propagando ni havas agitbrigadon, kaj ĉiu klubano devas scii bone rakonti pri E.

M.Bronŝtejn. Por niaj du tavoloj estas apartaj laboroj: komencantoj studas kantojn kaj similon, progresantoj okupiĝas pri tradukado. Kursanoj ankaŭ partoprenas kluban laboron. La skemo de ordinara kunveno: interŝanĝo de novaĵoj, laboro laŭ la plano (preparo de ekspozicio, kontrolo de tradukoj...). La lernantoj mem kunvenas kaj prelegas, lernejoj jam komencas inviti ilin por vesperoj. Ekzistas ankaŭ eksterkluba laboro.

V.Noĉovkin(Poltava). La ĉefa celo de lecionoj-kunvenoj estas ekposedi la lingvon. Ni multe atentas nian komunan kaj personan korespondadon. En nia klubo ne estas praktikataj amikaj rondoj, ekskursoj nek oftaj renkontiĝoj kun la dua poltava klubo.

B.Kolker(Ufa). E-Movado ne havas lernejojn, kaj la tutlandaj renkontiĝoj ne povas solvi la problemon. Eĉ aktivuloj faras dum parolado multe da eraroj. En kluboj ĉiu instruas,kiel povas. Necesas serioze pripensi la instruadon de progresantoj; tre gravas ankaŭ la idea eduko. Ankaŭ la socia signifo de nia laboro estas granda: se ni volas ion ricevi de oficialaj instancoj, ni devas same utiligi nin por ili.

E.Eselinas(Kaunas). Ĉiu klubano havas taskon dum 3-5 minutoj ion rakonti.

A.Lukin(Ĥarkov). Ĉe ni staras la problemo de informado inter neesperantistoj. En la klubo okazas apartaj kunsidoj de fakoj(scienca, tradukista, arta). Ĝeneralaj kunvenoj okazas unufoje en du monatoj, informado pri novaĵoj okazas unufoje en monato.

Z.Hafizova(Sterlitomak). Ekzistas fakoj. Post novaĵoj okazas iu prelego aŭ disputo, dum ĝi ni paroligas la homojn. Iom da tempo ni dediĉas al gramatiko.

T.Loskutova(Ivanovo). La kunveno daŭras dum du horoj: la unuan horon ni dediĉas al progresantoj, la duan por informado kaj cetera kluba laboro. Progresantojn post severa ekzameno ni solene akceptas en la klubon.

V.Aroloviĉ(Moskvo). Ĉiu klubanon havas presitan programon. La specifeco de la klubo estas abundo de gastoj- enlandaj kaj eksterlandaj, tio estas bona lingvolernejo. Funkcias tradukista kaj koresponda kursoj.

V.Ladygin(Zaporoĵje). Ne estas ejo por E-kursoj. La kunvenoj estas unufoje en monato.

R.Citlau(Ustj-Kamenogorsk). Klubanoj havas hejman taskon.

KONKLUDA VORTO (A.Gonĉarov).

En "Aktuale" ne estis artikoloj pri interesa kluba vivo. La ĉefaj klubaj laboroj estas:

1) preparo de E-prelegoj;
2) preparo de grandaj E-ekspozicioj, preparo de E-standoj;
3) traduka laboro;
4) publikigo de artikoloj en eksterlanda preso;
5) literatura laboro;
6) sinpreparo al la ekzamenoj de la E-Universitato;
7) scienca laboro;
8) kompilado de fakvortaroj, kolektado de originalaj kaj netradukeblaj vortoj kaj esprimoj.

La tria tago, 18.7.74

Temo: FAKA AGADO EN SEJM

V. LAPTEV - vicprezidanto pri faka agado.

El 9 fakoj raportis nur 5. Preskaŭ ĉiuj fakoj agas izolite, fakestroj ne propagandas sian laboron per "Aktuale". Ne estis starigitaj novaj taskoj antaŭ la fakestroj. La mas disciplino eĉ ĉe la fakestroj mem.

Bibliografia fako - V.CVETKOVA(Leningrad),(skriba raporto).

La laboro konsistas el du partoj: 1-e, registrado de E-libroj; 2-e, ~~kompletado~~ multobligo de la listo. Dum la jaro estis dissenditaj 32 leteroj al diversaj SEJM-urboj. Multaj kluboj tute ne respondis, aliaj ne ĝuste plenigis slipojn. Nun estas kolektitaj ĉ. 400 slipoj. La rusa parto jam estas preta. Ĉ. 70% da laboro estas farita.

Decido de la Konferenco: taksi la laboron de la bibliografia fako je 40 poentoj kaj nome de la komitato esprimi laŭdon al la estro de la fako.

Gazeta servo - A.Ĥarkovskij(Moskvo),(informas V.Aroloviĉ).

A.Ĥarkovskij publikigis unu artikolon en "der Esperantist" kaj unu en "Aktuale". Materialojn por redaktado li ne ricevis.

Decido de la Konferenco : taksi la laboron je 5 poentoj.

Koresponda servo - S.Neilande(Riga), (informas V.Laptev).
La farita laboro ne estas granda: estas starigita kontakto kun eksterlanda koresponda servo, estis senditaj adresoj laŭpete. En "Aktuale"ne aperis adresaro. En "Akordo estis anonco pri ebleco ricevi adresojn per la koresponda servo.
Decido de la Konferenco: la laboron taksi je 15 poentoj.

Kanta fako-ŜĈERBAKOVA N.(Moskvo), (raporto forestis).
Faka laboro preskaŭ ne estis.
Decido de la Konferenco: la laboron ne poentigi kaj taksi negative.

Magnetofona fako - A.ROGOV(Ĥmelnickij).
En la bulteno-1 estis listo, kiu enhavis 100 diversajn programojn. Venis kelkaj bendoj el pluraj urboj.
La Konferenco decidis taksi la laboron je 35 poentoj.

Metodika fako - JANULEVIĈ N.(Omsk).
Pro foresto de raporto kaj informo la Konferenco taksis la laboron negative kaj ne poentigis.

Naturamika fako - A.KILK(Tallin),(skriba raporto).
Okazis renkontiĝo, kiun partoprenis 70 homoj; en la programo estis 5 prelegoj, kelkaj ekskursoj k.t.p. Necesas kompili biologian terminaron. Estas elektita organiza komitato en kvanto 6 homoj por la sekva kunflugo.
Decido: taksi la laboron je 35 poentoj.

Poezia fako - D.LUKJANEC(Leningrad),(informas M.Bronŝtejn).
En la pasinta tendaro estis poezia vespero. En "Akordo" aperis kelkaj versoj, en Leningrado okazis buŝa E-almanako pri tradukitaj el la rusa kaj originalaj versoj. En "Akordo" en skiza formo estis la historio de E-poezio.
La laboro de la fako estas taksita je 15 poentoj.

Radioamatora fako - G.JASKOV(Barnaul), (skriba raporto).
21-foje parolis en etero kun eksterlandaj e-istoj-radioamatoroj, estis ankaŭ letera kontakto. Ne ricevis informojn de aliurbanoj pri la laboro. Mi planas organizi E-kurson,sed mankas instrumaterialo por etera instruado.
La laboro estas taksita je 15 poentoj.

Traduka fako - J.VLADIMIRCEV(Barnaul).
La fakestro laboris tre maldiligente. Estis organizita nur tradukista konkurso.
Decido: 5 poentoj.

Temo: INTERNA INFORMADO EN SEJM

"AKTUALE" . V.EBEL - redaktoro de "Aktuale".
Dum la pasinta periodo aperis 10 numeroj da "Aktuale", ĉiu numero enhavis ĉ. 7-8 paĝojn. Ĝenerale en 10 numeroj estis ĉ. 70 kontribuaĵoj, el ili 20 problemaj, 10-12 informaj,kaj la ceteraj estis anoncoj kaj sciigoj. Kluboj nemulte uzis eblecon elpaŝi en "A", pro tio ĝis la Nova jaro materialoj ne abundis. La informilo aperadis en kvanto 50 ekzempleroj kaj estis dissendata laŭ listo al SEJM-kluboj kaj SEJM-subtenantoj. En la estonta jaro estas planata pli granda eldonkvanto.
La Konferenco decidis taksi la laboron de la redakcio bone kaj komisiis daŭrigi la laboron samsukcese.

"AKORDO". Dum la jaro aperis 4 numeroj. por plimultigi la eldonkvanton mankis teknikaj rimedoj.
Estis proponoj, ke dum jaro aperu 2-3 literaturaj almanakoj;

ke literaturaĵoj aperu aŭ en "Aktuale" aŭ en "Akordo"; ke en "Akordo" estu nur informaĵoj, sed literaturaĵoj aperu en la neSEJMa organo "Amikeco", kaj ĉiu klubo subtene abonu almenaŭ unu ekzempleron da "Amikeco". Estas akceptita la lasta propono.

Pri "Akordo": ĉu ĝi daŭru aperadi samforme kiel pasintjare, ĉu dissendi la materialojn en koverto por pli facila ekspoziciado? Akceptita estas la lasta propono: estu dissendataj nebinditaj materialoj en kovertoj, kiuj nomiĝu "Informa kolekto". Pri la kompilado kaj dissendado okupiĝu Riga.

KKK. V.ŜILAS - la redaktoro de KKK.
Generale aperis nur 21 numeroj da KKK. Dum la pasinta jaro estis nur kelkaj. Estas tre malfaçile multobligi.

Pro la multekosto kaj paralelelismo kun "Aktuale" per voĉdonado KKK estas likvidita.

Temo: RILATOJ KUN OFICIALAJ INSTANCOJ

LANDSKALE

V. Aroloviĉ - unua vicprezidanto.
Estis planita dum la jaro organizi tutlandan renkontiĝon de regionaj packomitatoj, sed la intenco ne efektiviĝis. La rilatoj inter SEJM kaj SSOD ne estas stabilaj. La Universalan UEA-kongreson en Hamburg partoprenis 2 homoj anstataŭ la 4 planitaj. Kelkaj E-istoj partoprenis la Tutmondan kongreson de pacamaj fortoj en Moskvo.

B.Kolker - vicprezidanto pri kontaktoj kun oficialaj instancoj. Ni starigis kontakton kun la organizaĵo "Meĵdunarodnaja kniga" kaj pere de ĝi sukcesis mendi la romanon "Nuda inter lupoj". Necesas pli amase sendi leterojn en ĉi organizaĵon kaj ĝi nepre reagos.

SURLOKE

BARNAUL(A.Gonĉarov). La rilatoj de oficialaj instancoj estas bonaj. Oni proponis eldoni E-lernolibron, sed pro troa ŝarĝiteco de la loka ~~redakcio~~ eldonejo la propono ne estas efektivigebla.

UFA(N.Cvileneva). Estis kelkaj vizitoj al la loka packomitato kun propono kunlabori. Malgraŭ varmaj akceptoj nenio rezultiĝis. Al la regiona komitato de VLKSM ni prezentas raportojn.

ĈELABINSK(V.Laptev). Kun la packomitato ni ne trovis formon de kunlaboro.Ni kontaktis kun la internacia klubo "Orljonok";ĉe ĝi estis kurso,kiun oni sukcesis fini kun malfacilaĵoj.Kun aliaj urbaj instancoj la rilatoj estas bonaj.

DONECK(M.Belogolovskij).La klubo havas bonan pozicion en la urbo.Estas vasta kunlaboro kun la packomitato kaj oficialaj instancoj.

Ĥarkov(A.Lukin);Bonaj kontaktoj kun oficialaj instancoj forestas.La klubo raportas al la regionakomitato de VLKSM.

IVANOVO(T.Loskutova).Oficialaj instancoj tre bone rilatas al ni.Ili helpas en multaj entreprenoj(aferoj).

Kaŭnas(E.Eselinas).Oficialaj instancoj ne kontraŭas Esperanto--studadon,sed ne disponigas ejon.Ni raportas al la estro de l' palaco.

KIEV(M.Lineckij).Ne estis gravaj kontraŭdiroj al E-kursoj.Estas organizita klubo de internacia amikeco.

La kvara tago,19.7.74

(Daurigo)

KLAJPEDA(A.Vizgirdas).Nia klubo bone kunlaboras kun la palaco, ankaŭ kun la redakcio de "Sovetskaja molodjoĵ" kaj kun la urba biblioteko.La interrilatoj estas bonaj.Kun la partia komitato la interrilatoj malboniĝis antaŭjare post la malpermeso de BET.La komitato malkonsilis organizi amasajn elementajn E-kursojn por infanoj kaj junularo,sed rekomendis anstataŭi ilin per alifremdaj lingvokursoj.Progresigaj E-kursoj estas permesitaj.La komence donita permeso organizi E-SKT pli poste estis likvidita.Estis propono de la partia komitato informi ĝin pri forveturoj al iuj E-entreprenoj.

ĤMELNICKIJ(A.Rogov).La partiaj instancoj rilatas al ni bone.La loka preso mem interesiĝas pri ni.Kun la komitato de komsomolo kaj kun pacorganizaĵoj kontaktoj forestas.

LENINGRAD(A.Ŝalygin).Kontakton kun partiaj kaj komsomolaj instancoj ni ne havas.Kun pacorganizaĵoj la interrilatoj estas tre bonaj.

MAĤAĈKALA(A.Junusov).Pacorganizaĵojn ni ne havas.Kun la komitato de VLKSM post reelekto de nova sekretario pri propagandaj aferoj la intrerilatoj ŝanĝiĝis je malplibonaj.La televidio malpermesisi demonstri la filmon pri SEJT-15.

MOSKVO(V.Aroloviĉ).Ni sendis gratulon al la kongreso de VLKSM kun propono eldoni la materialojn de la kongreso en Esperanto.En la respondo estis danko kaj propono eldoni la materialojn rotaprinte. La interrilatoj kun la moskva preso estas malbonaj pro tre severa cenzuro.Aŭtune estas planate organizi en Moskvo pacbatalantan esperantistan asocion laŭ modelo de vjetnama asocio.Eblas publikigi E-materialojn nur en la revuoj "Politiĉeskoe samoobrazovanie" kaj "Bloknot agitatora".

POLTAVA(V.Noĉovkin). La obkomo de komsomolo post konatiĝo al nia statuto kaj laborplano rilatas bone al ni.Kun loka preso kaj biblioteko ni bone kontaktas.La partiaj instancoj ĝis nun nur promesas helpon.Packomitaton ni ne havas.

STERLITAMAK(Z.Hatizova).Konstantan kontakton kun la obkomo de komsomolo ni volas starigi sekvontjare.Bonaj rilatoj estas kun la loka redakcio.Plu neniujn kontaktojn ni havas.

Taŝkent(E.Perevertajlo).Bonaj kontaktoj estas nur kun la Asocio de amikeco kaj redakcio.

TULA(informas M.Bronŝtejn).Kontaktoj kun oficialaj instancoj pliboniĝas.De obkomo de komsomoloestas ricevita oficiala permeso organizi regionan renkontiĝon.

KOLOMNA(L.Borisov);La rilatoj kun oficialaj instancoj estas tre malbonaj.

USTJ-KAMENOGORSK(B.Anoĥin).Jam dumlonge ni havas bonajn rilatojn kun la obkomo de komsomolo.

VILNIUS(P.Egorovas).Rilatoj estas ne kontentigaj.Partiaj instancoj rekomendis anstataŭi instruadon de Esperanto per instruado de iu alia fremda lingvo.Gazetoj en la lasta jaro tute ne akceptis artikolojn.

Zaporoĵje(V.Ladygin).La streboj ekkontakti restis senrezultaj.

MIASS(L.Novikova).Ni kontaktas nur kun loka redakcio kaj kun la societo "Scio".

TIĤVIN(M.Bronŝtejn). Kun la redakcio estas bonaj rilatoj,kun aliaj

V?Aroloviĉ. Generala bildo:krom kelkaj urboj la rilatoj de oficialaj instancoj al ni estas bonaj.
B.Kolker.Laŭ speciala instrukcio pri Esperanto ni rajtas:
1. Fari kopiojn de postmilitaj libroj en kvanto ne pli multe ,ol 10-15 ekzempleroj.
2. Eldoni informajn foliojn,kontrolajn laborojn por korespondaj studantoj.
A.Gonĉarov.Je favoro de nia estonta oficialiĝonecesas nun informi oficialajn instancojn.En kelkaj urboj,kie oficialaj instancoj bone rilatas al Esperanto provu ni peti partiajn instancojn prisubteno kaj de fendo de Esperanto en superaj instancoj.Tio estas pli efektive,ol se tion faros mem esperantistoj.
Rezulte de voĉdonado la propono de A.Gonĉarov unuanime estis akceptita.
A.GonĉarovEsats propono eldoni bultenon monatan pri la plej gravaj E-novaĵoj en la mondo kaj kaj sendadi al pficialaj instancoj.
La propono estas akceptita.Tiu bulteno estu aldono al"Aktuale" kaj surloke estu retajpata en naciaj lingvoj.

DONECK(N.Starodubcev).En la klubo aktivas 5 personoj.Ni laŭ mendo en "Kniga-eksport"ricevis 10 titolojn (po 100 ekz.) de E-libroj. En 7 lernejoj konstante estas E-rondetoj,gvidataj de instruistoj pri fremdaj lingvoj?E-kurso estis en la centra biblioteko.La konferencon kaj la tendaron partoprenas 2 homoj.Du foje en la pionirpalaco okazis seminarioj por lernejaj geinstruistoj.

Laboro en lernejoj(N.Starodubcev).

En "Aktuale" estis sinturno al instruistoj.Mi sendis enketojn ,sed ricevis nur 14 respondojn.Estis dissenditaj al geinstruistoj 70lernolibroj.Estas dissendita la statuto de ILEI.En Sovetunio ĉijare Esperanton studis en rondetoj 319 gelernantoj.Hunhara E-Asocio sendis 300 ekz. da "Juna amiko" por abonado.Okazis abonado de "Pedagogia internacia revuo".Nun staras problemo fondi pedagogian sekcion de ILEIen Sovetunio.Estas necesaj almenaŭ 5 homoj.Kiel membroj de ILEI povas iĝi nur profesiaj instruistoj.La kotizojn eblas uzi enlande.Al la letero en la ministerion de klerigo respondo ne venis.
La propono de k-do N;Starodubcev estas akceptita.

Temo:Eksterlandaj rilatoj(forestas raporto de D.Cibulevskij)

Informas B.Kolker.
En la TEJO nia reprezento ne estas firma,ĉar ni ne havas oficialan organizaĵon.EN 2jaroj ni ricevis dufoje informan folion de TEJO.Poloj intencas kontakti kun ni:ili invitis por partopreni en Interlingvistika kongreso en Pollando.UEA petas sendi eltondaĵojn el landa gazetaro pri Esperanto.

T.Loskutova,G.Gercikov,P.Egorovas,A.Gonĉarov rakontas pri apartaj epizodoj de kontaktoj kun eksterlando.Sekvas raportoj pri kontaktoj kun eksterlando en skalo de kluboj.Kontaktoj de plej multaj konsistas el korespondado,banderolinterŝanĝoj,kontaktoj kun ĝemelo-urboj.Nur en Leningrad kaj Moskvo ofte estas eksterlandanoj.En Hmelnickij 1-2 homoj vojaĝas eksterlanden.
V.Aroloviĉ.La plej ĉefa formo de internaciaj kontaktoj estas korespondado.
N.Starodubcev.Necesas ne nur korespondi,sed kunlabori:interŝanĝi E-librojn,revuojn,k.t.p.

A.GonĉarovNecesas aperigi en "Aktuale" materialojn pri la temo:kion ni rajtas interŝanĝi kun eksterlando.Estas interesa eksperimento:klube ellabori ijnjn demandojn,kaj ĉiu klubano sendu ilin al siaj eksterlandaj amikoj.La respondoj estos bona materialo por sociologia statistiko.

V.Ŝilas.- la SEJM sekretario.Laŭ ricevitaj raportoj ni havas 1229 ligoj kun 40 landoj.Tute ne korespondas Birsk,Kaŭnas,Tallin,Taŝkent,Syktyvkar.

V.Ebelj.Interesajn materialojn el leteroj necesas publikigi en "Aktuale".

Temo:SOMERAJ ARANĜOJ KAJ ILIAJ PERSPEKTIVOJ.

SEJT

A.Gonĉarov.Nuna stato de niaj tendaroj ne kontentigas nin.Estas propono organizi du tendarojn:
1.laŭzone(okcidenta,orienta);
2.laŭaĝe(junulara,aĝula);
3.laŭ lingva nivelo(komencanta,spertula).
Al mi plaĉas la tria propono:duperioda tendaro,komence por komencantoj kaj poste por lingvosciantoj.

B.KolkerLa dua tendaro aspektos pale.Propono:plilonga tendaro kun du paralelaj programoj.

V.Ŝilas.Oni venigu nemultnombrajn kolektivojn de progresantoj por paroligi ilin.

L.BorisovPor tiu celo necesas organizi regionajn tendarojn.

V.Aroloviĉ.Tiu propono estas bona nur teorie:por du tendaroj mankas fortoj.Multaj komencantoj-progresantojpost tendaro ĉesas okupiĝi pri Esperanto.Verŝajne spertuloj malmilte atentas ilin.Necesas organizi pli multe da aranĝoj por progresantoj tiel,ke ili ne restu disponitaj al si mem.Mi proponas plibonigi programon por progresantoj.

N.KorĵenevskajaModela estis Altaja tendaro:pli ol duono da tendaranoj estis spertuloj,kaj progresantoj vole-nevole devis ekparoli. Se apartigi progresantojn estos pura krokodilejo(ekzemplis SKT-on).

N.Cvâleneva.Progresantoj devas vidi,ke eblas bone paroli esperante amase.

V.Ŝilas. Mi insistas preparan periodon.Komenĉe dum 5 tagoj apartaj tendaroj:konferenco kaj lernejo por tendaro.Ci okaze elstaras psikologia faktoro :progresantoj havos taskon preparisin por la komuna tendaro.

L.Medvedev.Propono:dum 2-3 jaroj eksperimenti,kiu skemo de tendaro estas la plej bona.

A.Ŝalygin.Organizi 3-gradan Universitaton:komencantoj,kandidatoj al esperantiĝo kaj esperantistoj.Tendarojn rajtas partopreni nur esperantistoj.

Estas voĉdonataj 4 proponoj por la skemo de tendaro:
1.A.Gonĉarov.-du apartaj dektagaj tendaroj,
2.B.Kolker.-5-taga konferenco kaj 15-taga tendaro,
3.V.Ebel.-du 10-tagaj sekvantaj unu la alian tendaroj.La unua por paroligi komencantojn,la dua -komuna.
4.V.Ŝilas.-5-taga prepara tendaro kun samtempa konferenco aliloke 10-taga komuna tendaro.

Akceptitas la propono De V.Ŝilas.

La loko de estonta SEJT:sinproponis Ustj-Kamenogorsk;Barnaul-rezerva loko.Esplori kondiĉojn por SEJT-18 la Koferenco komisiis al Vilnius;Tiĥvin kaj Taŝkent.

La kvina tago-20.7.74

SEJT-17 okazu meze ~~de~~ aŭ komence de aŭgusto 1975.
V.Aroloviĉ legas la programon de SEJT-16.Post ioma korekto la programo estas akceptita.

E-SKT

A.Gonĉarov.Ĉu SEJM havas fortojn organizi SKT sur alta nivelo?
V.Ŝilas. Ĉu SKT donis utilon por E-movado?

S.Smetanina.Organizo de SKT estas tre malfacila afero.Oficialaj instancoj postulas,ke la taĉmento enhavu ne ~~pl~~ malpli ol 50 personoj.La disciplino en taĉmento ne estas tre bona.La lingvonivelo en taĉmento estas tre malalta.Ankaŭ la mona flanko lamaq.Sed SKT laŭ mi estas eĉ pli grava ol SEJT.Necesas konservi tiun ĉi formon de E-laboro.Kaj E-SKT daŭru ne du monatojn ,sed ekzemle unu.
G.Gercikov(Talgar).SKT estas pli grava ol tendaro laŭ politika signifo.
La Konferenco komisiis al Barnaul esplori eblecon organizi SKT en Siberia zono.

Temo:REGIONAJ RENKONTIĜOJ,ILIA ORGANIZO

A.GonĉarovMultaj renkontiĝoj perdis siajn antaŭajn trajtojn.Estas bezonata nova formo de renkontiĝoj,nova en havo.

S.Gaidamavičius(Vilnius).Nin kontentigas nunaj formoj de renkontiĝoj.Dum ĉebaltaj regionaj renkontiĝoj ni priparolas SEJM-demandojn, organizas diversajn konkursojn.

Estas akceptita la propono de M.Belogolovskij aperigi en "Aktuale" la liston pri regionaj renkontiĝoj.

EKSTERLANDAJ AFEROJ -D.Cibulevskij(skriba raporto).
Estas starigitaj kontaktoj kun TEJO kaj aliaj E-organizaĵoj. Por ricevi esperantaĵojn el Kubo kaj aliaj aliaj landoj estas forsenditaj multe da E- libroj, sondiskoj k.t.p. El eksterlando venis 5 informiloj, kiuj estas dissenditaj.
Mi proponas pridiskuti la sekvajn demandojn:
1) ĉiun SEJT-on partoprenu kelkaj eksterlandanoj;
2) pri eventuala partopreno de sovetaj esperantistoj en TEJO-kongreso en GDR.
La decido de l' Konferenco: proponi k-don D.Cibulevskij kiel reprezentanton de TEJO.

Tendara komitato
Por gvidi la tendaran vivon la Konferenco elektis tendaran komitaton el la sekva konsisto:
1. T.Loskutova(Ivanovo)-estro de la komitato.
2. A.Gonĉarov(Barnaul)-gvidanto de la tendara programo.
3. V.Jakovlev(Barnaul)-ĉefkuracisto.
4. P.Egorovas(Vilnius)-respondeculo pri instruado.
5. V.Laptev(Ĉelabinsk)-respondeculo pri la distra parto.
6. B.Anoĥin(Ustj-Kamenogorsk)-tendara deĵorestro.

Temo: PROBLEMO SEJM-SEM

Estis proponoj:
1. Transformi SEJM je SEM, kaj la junulara Movado estu sekcio de SEM.
2. Konservi SEJM. Mezaĝuloj kunlaboru kun SEJM.
La Konferenco voĉdone akceptis la duan proponon.

Pri "Ligilo"

La neSEJMa organo "Ligilo" povas uzi materialojn de "Aktuale".

Esperanto kaj scienco

A.Gonĉarov proponis sin kiel fakestro de scienc-esplora fako de SEJM. kaj konigis proksimuman planon de laboro de la fako.

Pri fondo de Socia scienc-esplora instituto de Esperanto(SESIE). (Informas V.Aroloviĉ)

Estas kompilita adresaro de sciencistoj-esperantistoj. Al ili estas sendita la demandaro de ĉiu fako de la instituto: interlingvistika, literatura, historia, pedagogia k.t.p. La provizora rektoro de la universitato k-do B.Tokarev ricevis konsentajn respondojn pri kunlaboro de ĉ. 15 personoj.

Raportoj de noveveninta klubo

RIGA(A.Medinŝ). Dum la pasinta periodo aperis 4 numeroj de "Akordo". Ni kunlaboras kun la Klubo de internacia amikeco. Estis kurso por komencantoj; kelkaj artikoloj en la loka preso, malgranda ekspozicio, televida elsendo pri E., kiu elvokis ĉ. 300 reeĥojn. Ni partoprenis en "Neĝfloketo-74". En la klubo estas 25 membroj.

MEĴDUREĈENSK(S.Kotlarov). Estis unu elementa kurso, kiun finis 8 personoj. Aperis 2 artikoloj, estis kelkaj prelegoj.

NOVOMOSKOVSK(A.Kuprijanov). Estis E-kurso por studentoj, kiun finis 5 homoj. La tendaron partoprenas 2 personoj.

DONECK(N.Starodubcev). La klubo ekzistas kiel E-sekcio en la tuturba junulara klubo ĉe la gorkomo de komsomolo. En la klubo aktivas 5 homoj. Ni ricevis 10 titolojn da E-libroj laŭ mendo en "Kniga-Eksport". Estas sukcesa laboro en lernejoj: konstante ekzistas rondetoj en 7 lernejoj; ilin gvidas instruistoj de fremdaj lingvoj. Estis kurso en la centra biblioteko. La Konferencon partoprenas 2 homoj, la tendaron 2.

TJUMENJ(A.Kalaŝnikov). E-kurson finis 6 personoj. La tendaron partoprenas 3 homoj. Estis partopreno en REVU-8, REVU-9.

SVERDLOVSK(A.Motriĉ). De la 1973j. la klubon gvidas Ditjatjev kaj Rogoĵnikova. Estas malfacilaĵoj kun klubejo.

TULA. Estis rondeto. Ni partoprenas regionajn renkontiĝojn. Nia klubo ne havas ejon. Materialojn pri E. publikigas nur studenta ĵurnalo.

SALAVAT(V.Zibenkes). En la klubo estas 15 membroj, 7 aktivaj, boneparolantoj 3. Ni ekhavis ejon. Estis prelego pri E., ekspozicio, kelkaj artikoloj. Ni havas bonan eblecon propagandi E-on en la loka preso.

TBILISI(A.Kŝonzer). La klubo aperis antaŭ jaro; estas 24 klubanoj, aktivaj 17. Ni kunvenas en la Domo de instruistoj. Konstanta ĉambro ne estas. Regionajn renkontiĝojn ni ne partoprenas.

SOĈI(V.Bespalov). La klubo nobras 30 membrojn, el ili aktivas 13. La tendaron partoprenas 2 homoj. Estis 2 E-kursoj.

ROSTOV(A.Melnikov). En la klubo estas 30 membroj, aktivaj 10. Ni havas konstantan ejon. Estas vorta subteno de la VLKSM-komitato. Okazis 5-6 prelegoj en lernejoj kaj bibliotekoj. Estis artikoloj en la loka preso, okazis radioelsendo. Ni havas 5-6 komunajn korespondligojn. Estis viktorino pri ĈSSR, kelkaj vesperoj, 2 konstantaj E-rondetoj. La klubon eniras 5-6 E-veteranoj.

LIPECK(J;Gonĉarova). En la klubo estas 20-30 homoj - ĉiuj komencantoj. Ejo forestas. Ni kunvenas en la pedagogia instituto. Estis E-kursoj, vesperoj, kelkaj artikoloj pri E. Ankaŭ estas korespondado kun eksterlando.

EREVAN(A.Pototjan). La klubo fondiĝis 3-4 monatoj antaŭe; estas 25-30 klubanoj - ĉiuj komencantoj. Estis kelkaj artikoloj en la loka preso. Sperta esperantisto estas nur Gevorkjan.

FINANCA STATO EN SEJM - A.Vizgirdas(vicprezidanto pri financaj aferoj).
Dum la pasinta jaro estis elspezitaj 779r. 10k. por premioj, fonduso, SEJM-tajpilo, "Aktuale", "Akordo", KKK k.t.p.

SEKRETARIAJ AFEROJ - V.Ŝilas(vicprezidanto pri sekretariaj aferoj).
En la socialisma konkurado dum la pasinta periodo SEJM-kluboj laŭ raportoj perlaboris sekvan kvanton da poentoj kaj okupis jenajn lokojn.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. Ufa | 2392 | 21. Kaunas | 283 |
| 2. Riga | 2152 | 22. Doneck | 282 |
| 3. Klaipeda | 1778 | 23. Tula | 278 |
| 4. Barnaul | 1760 | 24. Ĉelabinsk | 275 |
| 5. Vilnjus | 1394 | 25. Sterlitomak | 245 |
| 6. Ivanovo | 1201 | 26. Kujbiŝev | 199 |
| 7. Omsk | 818 | 27. Kedainiai | 180 |
| 8. Ĥmelnickij | 644 | 28. Siktivkar | 133 |
| 9. Poltava | 611 | 29. Zaporoĵje | 109 |
| 10. Moskvo | 558 | 30. Velikie Luki | 105 |
| 11. Maĥaĉkala | 491 | 31. Kapsukas | 103 |
| 12. Viljandi | 464 | 32. Kievo | 98 |
| 13. Leningrad | 452 | 33. Liepaja | 48 |
| 14. Tiĥvin | 438 | 34. Kolomna | 45 |
| 15. Novosibirsk | 365* | 35. Tallin | 45 |
| 16. Taŝkent | 360 | 36. Sverdlovsk | 31 |
| 17. Miass | 354 | 37. Birsk | 0 |
| 18. Talgar | 338 | | |
| 19. Ĥarkov | 317 | | |
| 20. U-Kamenogorsk | 308 | | |

La SEJM-prezidanto A.Gonĉarov solene enmanigas premiojn al la kluboj, okupintaj la unuajn tri lokojn: al Ufa - honorfolion, librojn kaj la Zamenhof-pokalon; al Riga - honorfolion kaj E-kurson sur sondiskoj; al Klaipeda - honorfolion kaj E-rusajn vortarojn. La klubo de Viljandi, okupinta la unuan lokon inter la kandidatoj, ricevas libron.
V.Ŝilas proponas en estonto rekandidatigi klubojn, kiuj ne kolektis 100poentojn.
La propono estas akceptita.

---

*La raporto por la dua periodo ne estis ĝustatempa. En la dua periodo estas perlaboritaj 383 poentoj. Sume 748.

# DECIDOJ
## DE LA SEJM-KONSILANTARO

1. Konfirmi kiel venkintojn de socialisma konkurado respektive klubojn de UFA, RIGA kaj KLAIPEDA kaj premii ilin.

2. Esprimi laŭdojn al la kluboj, okupintaj la 1-10 lokojn en la socialisma konkurado, nome: Ufa, Riga, Klaipeda, Barnaul, Vilnjus, Ivanovo, Omsk, Ĥmelnickij, Poltava, Moskvo.

3. Distingi la E-klubon de Viljandi, okupintan la 1-an lokon inter la kluboj-kandidatoj per librodonaco.

4. Promocii al la kategorio "aliĝintaj" la E-klubojn de TALGAR, TIĤVIN, VILJANDI kaj MIASS.

5. Transigi pro nesufiĉa aktivado al la kategorio "kandidatoj" la E-klubojn de Birsk, Kievo, Tallin.

6. Konfirmi kandidatiĝon de E-grupoj el SALAVAT(aŭspicias Ufa), NOVOMOSKOVSK(aŭsp; Zaporoĵje), TJUMENJ(aŭsp. Barnaul), MEĴDUREĈENSK (aŭsp. Barnaul) kaj SOĈI.

7. Riproĉi pro maldiligenteco en la agado al la E-kluboj de Kolomna, Liepaja, Zaporoĵje, Kujbiŝev, Kaunas.

8. Enkonduki la minimumon de aktivecoj sume je 100 poentoj jare por transiro de kandidatoj al aliĝintoj kaj inverse.

9. Konfirmi kategorion "subtenanto de SEJM". Subtenantoj de SEJM helpas ĝin finance - individuoj minimume per 10rb., grupoj per 20rb. agadjare.

10. Rajtigi klubojn-subtenantojn sendi po 1-2 reprezentantoj al SEJT-oj.

11. (Ne estas publikigata).

12. Taksi la laboron de la malnova Komitato "bone".

13. Elekti novan SEJM-Komitaton en jena konsisto:
Prezidanto - V.Aroloviĉ;
Unua vicoprezidanto - D.Cibulevskij;
Sekretario - V.Ŝilas;
vicoprezidantoj pri:
- fakoj - V.Laptev;
- financoj - N.Cvileneva;
- interna informado - V.Ebel;
- lernejoj - N.Starodubcev;
- renkontiĝoj - M.Bronŝtejn.

14. Esprimi laŭdon al la gvidanto de la bibliografia fako k-dino V.Cvetkova pro la farita laboro.

15. Taksi negative la funkciadon de la kanta, metodika, tradukista fakoj.

16. Konfirmi estrojn de la fakoj/servoj: bibliografia - V.Cvetkova, gazetara - A.Ĥarkovskij, historia - J.Petrulis, koresponda - S.Neilande, kanta - A.Vizgirdas, lumbilda - S.Kotlarov, magnetofona - S.Sadauskis, metodika - A.Rogov, naturamika - A.Kilk, poezia - D.Lukjanec, radioamatora - G.Jaskov, scienc-teknika - A.Gonĉarov, tradukista fako - V.Samodaj.

17. La novkonsista Komitato kaj novaj fak-servoestroj plenrajtiĝas ekde la 1-a de septembro 1974.

18. Determini kiel ĉefaj labordirektoj de SEJM por la agadperiodo 1974/75 instruadon kaj fakan laboron.

19. Komisii al la Komitato esplori eblecojn pri kreo de la landa E-Asocio (dumjare).

20. Komisii al la Komitato fari necesajn ŝanĝojn en la Taksa Demandaro (ĝis la 3-a de septembro).

21. Komisii al la Komitato ellabori regularon de SEJT-oj (ĝis la 1-a de decembro).

22. Komisii organizon de la 9-a SEJM-Konferenco kaj SEJT-17 al la E-klubo de Ustj-Kamenogorsk. Rezerve-al Barnaul.

23. Komisii esplori eblecojn organizi la 10-an SEJM-Konferencon kaj SEJT-18 al la E-kluboj de Vilnjus, Tiĥvin, Taŝkent.

24. Samtempe, sed aliloke de Konferenco, laboru paroligaj grupoj por partoprenantoj de SEJT (formulo 5+10).

25. Komisii al k-do B.Kolker koordini kontaktojn de SEJM-kluboj kun eldonejoj kaj libroperantaj organizaĵoj.

26. Proponi al la kluboj plioftigi informadon pri E. al lokaj oficialaj instancoj.

27. Pozitive taksi aperadon de "Aktuale".

28. Likvidi KKK kaj "Akordo".

29. Anstataŭ "Akordo" aperadu "Informa kolekto" - ĵurnaloj, fotoj, div. propaganda kaj informa materialo.

30. Subteni per abonado kaj livero de materialoj la almanakon "Amikeco" kaj komisii al k-do Rogov reprezenti la interesojn de SEJM ĉe la redakcio.

31. Aperigadi ĉe "Aktuale" ruslingvan informfolion kun gravaĵoj.

32. Prezenti materialon pri SEJM al "Ligilo".

33. Emisii novan varbfolion por subtenantoj.

D E C I D O
de la postkonferenca konsilantara
kunveno

Kandidatigi al SEJM la E-klubojn de TBILISI kaj ROSTOV-DON.

(La 27-an de julio 1974).

Protokolis: N.Stolbun(Barnaul);
L.Novikova(Miass);
V.Kazanova(Barnaul).

Redaktis V.Ebel(Barnaul).

---

Redakcio:
656099 BARNAUL-99,
a.k. 11, "Aktuale"

## LA POLTAVA EPOPEO

(responde al la malfermita letero de k-do Grigorenko V.V.)

Oni diras, ke historio ripetiĝas. Ŝajnas, ke prave. Almenaŭ se temas pri la Poltava batalo, kiu famigis la urbon en 1709. Ne pasis eĉ 270 jaroj - kaj jen denove batalo kaj denove Poltava. Herooj kaj maliculoj, martiroj kaj burokratoj, intrigantoj kaj veremuloj - ĉiuj agantoj de la grandaj eventoj ne mankas ankaŭ ĉi-foje.

La rolon de heroo plenumas jam vaste konata Grigorenko V.V. (Li organizis SEJTon.) La rolo de intrigantoj trafis al la SEJM-komitatanoj. (Ili ĉiel malhelpis efektivigi la tendaron kaj - supro de maliceco - anstataŭ danki elsejmigis PEKon.)

Tiel aspektas la bildo pentrita de V.V. Kia ĝi estas en realo? Por kompreni tion, ni komencu "ab ovo".

I. En la Poltava E-klubo (prezidanto k-do Noĉovkin V.J.) aperis fervora membro (K-do Grigorenko V.V.).

II. La duopo proponas sian klubon (DUME SOLAN EN LA URBO) kiel organizonton de la 19-a SEJTo. La konferenco akceptas la proponon.

TIEL LA POLTAVA E-KLUBO (mi ripetas: dume SOLa en la urbo) IĜIS LA MASTRO DE OKSEJT-19.

III. Intertempe komenciĝas malakordoj inter k-doj Grigorenko kaj Noĉovkin. V.V. fondas sian propran (DUAN!) klubon en Poltavo.

Ĉar havi po 2 klubojn (des pli rivalajn) en 1 urbo por SEJM estas nepardonebla lukso, la komitato proponas al la Poltavanoj solvi la aferon interne. SEJM-klubo restas tiu de Noĉovkin.

IV. La "disputoj" ne ĉesas, kaj kd-o Grigorenko petas por sia klubo apartajn Kurte kaj Aktuale.

TIEL LA PLI NOVA E-KLUBO EN POLTAVO FARIĜAS SEJM-SUBTENANTO (atentu: SUBTENANTO sed NE MEMBRO!).

V. Preparlaborojn por la tendaro kaj konferenco efektivigas k-doj Noĉovkin (kvankam minimume) kaj Grigorenko KUNE.

K-do Noĉovkin (kiel SEJM-kluba prezidanto) NE RIFUZAS aranĝi la tendaron. K-do Grigorenko (kiel prezidanto de la subtenanta klubo) NE PETAS proklami sian klubon la mastro de OkSEJT.

La komitato esperas, ke la komuna laboro repacigos la aktivulojn. VANE.

VI. K-doj Noĉovkin kaj Grigorenko prezentas al la sekretario raporton pri la agado de 7 (sep!) Poltavaj urbaj kaj regionaj E-kluboj. (Parenteze, kiom da E-istoj devas do esti en Poltavo?! Kaj kie do ili ĉiuj estis dumtendare?)

La sekretario STRIKTE LAŬ LA REGULAJ konsideras nur la laboron de la SEJM-klubo (tiu de Noĉovkin).

Rezulte, Poltavo perdas ĉiujn ŝancojn okupi la 1-an lokon. AMBAŬ K-DOJ OFENDIĜAS KAJ ANONCAS (unu - publike; la alia - kuluare), KE LA POLTAVAJ E-ISTOJ (ĉiuj?) VOLAS HAVI NENION KOMUNAN KUN SEJM kaj de nun agos aparte.

La prezidanto de SEJM provas persvadi, ke la kamaradoj pripensu la aferon, senemociiĝu kaj ne hastu. Tamen la Poltavanoj asertas, ke tio estas ilia definitiva kaj neŝanĝebla decido.

VII. Al la redakcio de Kurt venas letero de k-do Noĉovkin, petante anonci eksiĝon de la Poltava E-klubo el la SEJManaro. (Pri Grigorenko en tiu letero eĉ ne temas. Kaj liaj asertoj, ke V.J. sendis tiun leteron por ke oni anstataŭigu lin per V.V., estas nura blufo.)

La komitato opinias, ke eliĝi rajtas ĉiu (eĉ se tio ne plaĉus al la estraro) kaj konfirmas la elsejmiĝon.

TIEL POLTAVO IĜIS EKSTER SEJM.

Do, la komitato ne nur NE FORPELIS sian membron (nun jam eksan), sed eĉ PROVIS RETENI ĝin en sia anaro. Kaj nakve temas ne pri PERFORTA ELSEJMIGO (kiel asertas en sia letero V.V.), sed pri LIBERVOLA ELSEJMIĜO de PEKo.

IX. VERE, multobligante la adresaron de OkSEJT-19 k-do Cibulevskij forigis la adresojn de kelkaj Poltavaj tendar-partoprenintoj. Li faris tion meminiciate kaj influe de emocioj. Pro tio li ricevis riproĉojn de la aliaj komitatanoj. Tamen ne plenmerite ĉar k-do Grigorenko ĝis nun NE SENDIS al la komitato:
1) B-partojn de la konferenc- kaj tendar-aliĝiloj;
2) financan raporton.
Kaj sen tio ne eblas difini, kiu FAKTE partoprenis la aranĝojn.
(Cetere, ankaŭ la statistiko estas fuŝita. Trovu A-4 kaj provu kalkuli. Kompili bilancon vi ne sukcesos.)

---

Per tio ni finu la konstatan parton de nia "malfermita respondo" kaj komencu la rezonan.

---

Fojfoje okazas, ke iuj estretoj, ricevinte "kritikan signalon", rapidas tuj kolekti kompromitajn materialojn pri ties aŭtoro por poste demandi "juĝisto kiu".

Ni ne estas el tiu kompanio. Sed pri kelkaj agadmetodoj de k-do Grigorenko ENDAS rezoni publike.

Kontaktine kun E kaj malkovrinte, ke sur tiu kampo estas multaj faŭkantaj breĉoj, k-do Grigorenko tuj komprenis, ke plurajn el ili povus ŝtopi ĝuste li. Kaj venos famo, aŭtoritato kaj eble ankoraŭ io...

Strebo al famo apenaŭ estas riproĉinda. Sed "famo ajnapreze"... Onidire, "celo praviĝas rimedojn". Laŭ mi, nur onidire. Fiaj rimedoj estas ne por noblaj celoj.

Ni ne scias, kion precize celas k-do Grigorenko. Eble ion utilan kaj valoran. Sed koncerne liajn rimedojn, ni ne havas dubojn. HONTENDAJ RIMEDOJ! Taŭgaj nur por la "Herooj" de Zoŝĉenko.

Aro da intrigoj, klaĉoj kaj fiaj venĝetoj - nure tio konsistigas la "aferon pri elsejmigo", kiun tiel verve kaj pompe reĝisoris kaj realigis Vasilij Vasiljeviĉ.

La eventualaj celoj estas:
1) kompromiti la tro postulantan komitaton (financan raporton al ĝi prezentu; E-istojn el la 7 raportitaj kluboj - montru; partoprenontojn de la tendaro kaj konferenco invitu nur laŭ la regulaand sed ne laŭ la propra gusto - ĉu ne sufiĉas por indigniĝi?);
2) eksigi SEJMon por iĝi gvidanto de la tutlanda movado;
3) okupi la lokon de k-do Noĉovkin en la urbo kaj SEJM.

Ja tion V.V. celas jam dumlonge. Komence li volis, ke aldone al la jam akceptita klubo de V.J. oni akceptu al SEJM ankaŭ lian klubon. La komitato respondis: "En unu urbo - unu klubo-membro. Kiu el vi reprezentos la urbon - decidu mem." Kaj ĝuste tion - decidi mem - V.V. ne volas. Li deziras, ke ĉion decidu ONI - kaj li "sensange" okupu la aspiratan lokon.

Venas oportuna okazo - k-do Noĉovkin forte ekscitiĝas pro la pritakso de la farita laboro. V.V. lerte pligrandigas la ofendiĝon kaj provokas k-don Noĉovkin eksiĝi el SEJM. V.J. anoncas tion publike dumkonference kaj poste surpaĝe de Kurte. V.V. deklari publike ne rapidas. Li, kiel reĝisoro, bone scias, kio kio okazos en la 2-a akto. (Tamen en kuluaroj, ofenditmiene, li konfirmas en privataj konversacioj, ke Poltavaj E-istoj - ne la klubo de Noĉovkin! - aros ekster SEJM.)

Sekvas periodo de pacienco. V.V. atendas, kiam:
1) oni forgesos pri liaj kuluaraj paroloj;
2) estos konfirmita la eksiĝo.

Novembre la Poltava loko en SEJM oficiale ekvakis - kaj V.V. impetis ŝtopi la truon.

Ĉar li ne sukcesis fari tion per leterbombardado de la komitatanoj, V.V. turnas sin al la "publika opinio": defendu la veron!

(Provita metodo. Sed danĝera. Ĉar ĝuste la veron ĝi ofte rivelas.)

Por pliigi la efekton li sidigas Poltavajn E-istojn (almenaŭ ili nomas sin tiuj) kaj diktas "iliajn" leterojn al pluraj SEJM-E-istoj: "Mi kun vi konatiĝis dum la OkSEJT'19, tial bonvolu konfirmi al D.Cibulevskij kaj aliaj SEJM-komitatanoj, ke kun mi vi konatiĝis en la tendaro, t.e. ke mi partoprenis la OkSEJT-19" (antaŭ mi kuŝas nur 2 tiaj leteroj kun la samaj petoj kaj eraroj, sed evidente da ili estas multe pli ol ĉi tiom).

Por kio tiom da tumulto? Kaj por kio V.V. bezonas SEJMon, se laŭ li ĝi estas nur "simbola" kaj regata "de formalistoj"?

Multas demandoj. Mankas spaco. Tial ni faru konkludojn.

I. V.V. FAR IS en la urbo GRANDEGAN laboron por realigi la tendaron kaj konferencon. (Tamen sen SEJM li NENION sukcesus. Kaj apenaŭ necesas tion pruvi.)

Pro la titana laboro DANKEGON.

II. Plenumante preskaŭ ĉiujn laborojn sola, k-do Grigorenko decidis, ke li estas la sola mastro de la aranĝoj kaj sekve povas fari kion ajn. Li invitis al la tendaro kaj konferenco personojn, kiuj laŭ la regularo ne rajtas partopreni la aranĝojn. Rezulte - abundego da krokodilaĉoj.

Estante superŝarĝita per diversaj administraj laboroj, V.V. ne povis okupiĝi pri la programo. Aliaj Poltavanoj eĉ entute ne aperis entendare aŭ ie kaŝis sin. Rezulte, la programo estis multe malpli altnivela ol povus esti. (Kompreneble, ne nur la organiza komitato (= V.V.) kulpis pri la programo. Sentiĝis ankaŭ manko de la prezidanto kaj v/prezidanto de SEJM pri renkontiĝoj. Tamen ankaŭ sen ili la paralela orienta tendaro pasis ege pli altnivele.)

K-do Grigorenko tute ignoris la postulojn de la komitato raporti pri la financaj aferoj. Li furioziĝis, kriis kaj rezistegis, se D.Cibulevskij (v/p de SEJM PRI FINANCOJ!) petis ian dokumenton. (En la letero V.V. nomas tion - kompromito de la estraro kaj mortigo de la klubo en la okuloj de oficialuloj.)

III. K-doj Noĉovkin kaj Grigorenko raportis pri multego farita. Ni ne kontestas tion. Sed se post tiu laboro ni vidas nur 3 realajn, vivajn, "farnajn" E-aktivulojn - V.V., V.J. kaj A.Kolesnik - tio igas pensegi. Aŭ la laboro ne estas tia, kia oni ĝin prezentas, Aŭ la rezultoj estas ne tiaj, kiaj devas esti - kaj sekve necesas ŝanĝi la aged-metodojn.

La nuna situacio, kiam V.V. penas fari ĉion memstare estas nenormala kaj likvidenda.

IV. E-movado ne estas areno por lukto de ambicioj, nek soklo por monumentoj. Ĝi estas plugenda kampo. Kaj se vi, V.V., havas alian opinion - vi ne estas VERA E-isto.

V. Povas esti, ke la menciitaj supre motivoj kaj agoj de k-do Grigorenko estas miskomprenitaj aŭ mistraktitaj. Se estus tiel, ni nur ĝojus.

VI. En la nuna momento, kiam en Sovetio estas fondata E-Asocio, SEJM havas ekstreme grandan kaj gravan laboron. Estas ellaboritaj proponoj, raportoj al la komsomola kongreso, al CK KPSU, SSOD ktp.

Tial ni povus entute ignori la kampanjon de Grigorenko. Sed tio estas ero principa kaj ni decidis meti ĉiujn punktojn super "i".

VII. La Poltava batalo-I alportis al la urbo famon; la batalo-II - "fi"...

Komisie de la komitato

Prezidanto de SEJM (A.Melnikov)

1978.04.28

# Novaĵoj el Ĉeĥoslovakio.

(aldone al "Aktuale")

= La sekcia prezidanto /Teknika Sekcio de ĈEA/ inĝ. Z. Pluhaŕ la8=an de junio t.j. sendis al la sekretario kaj kopie al la ceteraj komitatanoj kaj al ĈEA eksiĝan leteron. La estiginta situacio estas solvata en la komitato.

= La sekretario mendis en "Hungara Kulturo" en Praha 5=lingvan komputikan terminaron, kiu inkluzivas Esperanton.

= La sekretario dissendis specialajn materialojn al 6 membroj, komput/il/istoj, instigante ilin formi fakan laborgrupon.

= ĈEA ricevis aprobon flanke de la Ministerio pri kulturo por eldoni la libron de inĝ. d=ro M. Tuma CSc "Pri la varmo". Ĝi aperos ankoraŭ nunjare (eldonkvanto = 1000 ekz.)

= En la Esplorinstituto de kemi=industriaj ekipaĵoj en Brno, kunlabore kun ties filio de Ĉeĥa Scienc=Teknika Societo /VTS/, niaj membroj okazigis /1.07.1974/ publikan informan kunsidon pri Esperanto en tekniko kaj scienco. Aluune estis projekciataj du filmoj de FIAT.

= Matematika vortaro Esperanta=angla=ĉeĥa= franca=germana=pola=rusa estas kompilata sub gvido de ties iniciatinto W.E. Klimek el Pollando.

= Internacia Esperanto=klubo Aŭtomobilista (IEKA) en Ĉeĥoslovakio havas nun 19 membrojn.

= FIAT eldonis 6=lingvan aŭto=turisman vortareton, kiu inkluzivas Esperanton laŭ propono de IEKA. Ĝi enhavas 400 terminojn kaj kompletajn frazojn, utilajn dum aŭtomobilvojaĝoj.

= Esperanto programita kaj koncerna eluzo de cibernetiko estas temoj de la konferenco, okazinta la 6=an de aŭgusto t.j. en Budapeŝto. La konferencon iniciatis s=ro Hermann Behrmann el FRG.

= Plurlingva vortaro pri la konceptoj de la komputil=aplikado por kompani=direktado = estas verko de Siklaky Istvan kaj Ruisz Rezsö (Hungario). Resumo: 882 terminoj de la komputa kaj trukarta teknikoj estas listigitaj en kvin lingvoj (hungara, germana, angla, rusa, esperanta) laŭ tri manieroj = laŭ alfabeta vico de la koncerna lingvo; laŭ arbitra nombroviĉo; laŭ temaj grupoj. La libro aperis en Budapeŝt en 1972 ĉe Szamitastechnikai Oktato Központ, 464 p., 19 cm.

= Internacia komerca=ekonomika vortaro de F. Munniksma k.a., 535 p., 22 cm, bindita, eld. 1974j. Enciklopedia vortaro por komerco kaj ekonomio, kun difinoj en la angla kaj Esperanto, kaj tradukoj en germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala kaj sveda lingvoj.

Ottò Haszpra el Budapeŝto, eminenta scienculo de la hidroteikniko, fariĝis doktoro de la teknikaj sciencoj. La titolo kaj la resumo de la disertacio estis skribitaj en sep lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto.

= X = X = X = X = X = X = X = X =

Karaj samideanoj! Tiu ĉi paĝo de "Novaĵoj el Ĉeĥoslovakio" estis kompilata laŭ la julia 1974 numero de bulteno de Teknika Sekcio de ĈEA "TS informas" kaj enhavas ankaŭ novaĵojn el aliaj landoj.

Kompilis v/p de SEJM pri eksterlandaj aferoj D. Cibulevskij